

sub la suda kruco ★
decembro 2018

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25[4] numero 133 decembro 2018

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns
Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero


15-an de februaro 2019

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.**

Copyright © 2018 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Meduso en akvario

- 
- 4.** Dunedin: Bela, historia urbo en suda Nov-Zelando
 - 6.** Vizito al Tasmanio
 - 8.** Vojaĝi en kaj el Hungarujo
 - 10.** Libro Recenzo - Antaŭ unu jarcento - La granda milito kaj Esperanto
 - 12.** Izolitaj homoj - Aŭstraliaj verkintaj en Esperanto
 - 15.** Kio estas familio?
 - 17.** Trajto de ĝentileco
 - 18.** Kelkaj el miaj Esperanto-travivaĵoj
 - 21.** Plasto en oceanoj
 - 22.** Piroteknikaĵo
 - 23.** Kiel verki tekston por la elektronika medio
 - 26.** Ekskurso al Peucang Insulo kaj Handeuleum Insulo
 - 29.** Recenzo de “Complete Esperanto”

decembro, du mil dekok



Unu el miaj multaj interesoj estas geometrio. Ĉijare mi iris al grupo por tie instrui kaj lerni pri la “Solidoj de Platono” (regulaj poliedroj). Do en vendejo por brokantaj libroj kaptis mian atenton libro kun titolo “Priskriba Geometrio”. Aŭtoro ROBERTSON. Mi flankenmetis ĝin dum monatoj sed antaŭnelonge enrigardis ĝin kaj rimarkis ke R.G.Robertson estis la nomo de la aŭtoro kaj mi pensis, “ĉu tiu estis la R.G.Robertson el Manlio kiu ankaŭ estis Esperantisto kaj Profesoro?”

Do trarigardante malnovajn eldonojn de The Australian Esperantist mi konstatis ke Robbie (kiel li nomiĝis inter la E-grupo) ja lekcii pri meĥanika inĝinierarto ĉe la Universitato de Nova Sudkimrujo, kie la libro estis eldonita. Robbie estis konata inter la E-grupo kiel klerulo pri multaj aferoj.

En okjara periodo, kiam pro akcidento li ne kapablis piediri, li multe studis pri tre diversaj temoj. Tiam li iĝis magistrulo de meĥanika inĝinierarto. Bonŝance post operacio li regajnis la povon piediri.

Do hazarde mi aĉetis libron de Robbie senscie.

Al ĉiuj kontribuantoj kaj legantoj, salutojn por la jarfino kaj komenco de nova.

<http://math.ucr.edu/home/baez/platonic.html>



R. G. Robertson parolas ĉe la kongreso en Sidnejo, 1980


Dunedin: bela, historia urbo en suda Nov-Zelando

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Dunedin troviĝas en la suda parto de la suda insulo de Nov-Zelando. Ĝi estas facile atingebla per rektaj flugoj el aliaj urboj de Nov-Zelando kaj Brisbano. En la 19-a jarcento, Dunedin estis dum iom da tempo la plej grava kaj riĉa urbo de Nov-Zelando ĉefe pro la malkovro de oro en la apuda regiono Otago. En Dunedin fondiĝis en 1869 la unua universitato de Nov-Zelando. Nun, kun preskaŭ 130.000 enloĝantoj, Dunedin estas la sesa plej granda urbo en Nov-Zelando kaj la dua plej granda en la suda insulo (post



Statuo de Robbie Burns en la urbcentro



Unu el multaj historiaj preĝejoj en Dunedin

Christchurch).

Kvankam ĉefe angloj venis al aliaj regionoj de Nov-Zelando, venis al Dunedin multaj skotoj. Fakte, 'Dunedin' estas la malnova skotgaela nomo de Edinburgo. Oni ankoraŭ vidas la skotan influon, ekzemple

per la nomo de stratoj, multaj lokanoj kies lasta nomo komenciĝas per Mc aŭ Mac, kaj granda statuo de Robbie Burns en la urbcentro.

Dunedin estas fama pro ĝia universitato kiun multaj junuloj el aliaj partoj de Nov-Zelando kaj aliaj landoj elektas ĉeesti. La universitato estas precipe fama pro ĝia fakultato pri medicino. Kun proksimume 20.000 studentoj kiel granda parto de la loĝantaro, Dunedin estas preferata loko por junuloj kiuj ŝatas viziti restoraciojn, trinkejojn, kaj sportejojn ktp. Ankaŭ domluado estas malpli kosta ol en aliaj urboj kiel Wellington aŭ Auckland, kvankam multaj domoj estas tre malvarmaj dum la vintro.

Dunedin estas interesa loko por turistoj. Ĝi havas multajn belajn malnovajn konstruaĵojn kaj domojn, faman 'kastelon', plaĝon, kolonion de albatrosoj ktp. La apuda regiono estas nekredible bela kun multaj historiaj vilaĝoj kun postlasaĵoj de la orminada epoko. Queenstown estas facile atingebla je 3-4 horoj per aŭtobuso aŭ aŭtomobilo. Laŭ mi, tiu estas la plej vizitinda loko de Nov-Zelando kun belega pejzaĝo kaj neĝkovritaj montoj.

Ĉefa konstruaĵo de la universitato



Vizito al Tasmanio

INDRANI BEHARRY-LALL (ADELAJDO)

Preskaŭ je la fino de Septembro mi vizitis Tasmanion. Ne estis mia unua vizito. Kiam mi unue venis al Aŭstralio por labori, mi provis viziti ĉiujn provincojn ĉar mi nur venis por labori du jarojn. 30 jarojn poste...

Nia jara "Clogging" kunveno (estas ia formo de dancado kion mi faras) okazis en Burnie. Do mi decidis poste vojaĝi al Hobarto por revidi la lokon. Mi kontaktis Kam Lee kiu tre afable montris al mi diversajn vidindajn lokojn. Mi trairis la faman MONA muzeon. Ni vojaĝis al Richmond kie estas la unua ŝton-ponto en Aŭstralio (konstruita per la malliberuloj).

Kam ankaŭ provis aranĝi vespermanĝon kun la lokaj Esperantistoj sed nur Sally Liggins





povis ĉeesti. La sekvantan tagon ŝi veturigis min laŭ bela marbordo al Huon valo.

Krome mi ankaŭ partoprenis du tut-tagajn ekskursojn. Unu iris al Bruny insulo kie per jetboato ni rigardis la imponan marbordon kaj povis vidi fokojn kuŝantajn sur la rokoj. La marvojaĝo mem estis tre ekscitiga tra irante mallarĝajn kelmetro-altajn ŝtonegojn! La dua ekskurso estis al Freycinet insulo kaj Wineglass (Vinglasa) golfo. Post iom

da grimpado ni povis vidi el supre kial oni nomis la golfeton "Wineglass golfo".

Ĉu vi povas diveni la strangan bildon en kiu mi rigardas supren? Ĝi estas en la "Groto" de MONA (la Muzeo de Malnova kaj Nova Arto), kie mi kuŝas sur "akvofalo" el kusenoj kaj suprenrigardas al brilkoloraj, lumigitaj, floroformaj plastikaĵoj.

Estis ĝuinda ferio entute kaj ĝojo renkonti almenaŭ du Esperantistojn en Hobarto.



Vojaĝi en kaj el Hungarujo

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Kiam mi ankoraŭ estis en Aŭstralio, malgraŭ longaj klopodoj mi ne trovis kontentigan solvon por iri de Vieno al Pécs kaj poste de Pécs ĝis Beograd. Ĉiam la informoj montris ke necesas ŝanĝi de trajno al alia trajno plurfoje. La distanco inter Beograd kaj Pécs estas nur ĉirkaŭ 220km, do oni bezonas tri horojn per aŭto kontraŭ pli ol dek horojn per trajno, sed ne ekzistas busoj.

Nur surloke danke al la ok libretoj-Vojo - ABoCo de Hungarujo-, kiujn al mi donacis Judith Kovacs, mi komprenis la problemon. Mi tute ne scias kiam tiuj libretoj aperis. Ili eldoniĝis de Landa Fremdtrafika Oficejo en Budapest. La respondeca

redaktoro estas Marta Kosaly kaj respondecas pri la eldonejo Dr. Andras Vitez.

Kiel montras la mapo, ĉiuj vojoj iras al kaj el Budapesto. Pro tio, por iri de la sud-okcidento al la sud-oriento necesas nepre iri tra Budapesto, kio multe longigas la vojaĝon.

Tamen tio ne estas specialaĵo de Hungarujo. En Melburno ni same spertas ke por trajni de la okcidento al la oriento nepras irado tra "Flinders street" stacidomo aŭ proksimaj stacidomoj. Same en Parizo la mapo de transporto per trajno montras liniojn kun sama deirpunkto. Eble tio estas la rezulto de certa maniero pensi iaepoke.





**AŬSTRALIA
KONGRESO DE
ESPERANTO**
2019



AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

kongreso de esperanto
kaj somerkursaro

ALIĜU NUN ĈE

[HTTP://AEA.ESPERANTO.ORG.AU/KONGRESO](http://AEA.ESPERANTO.ORG.AU/KONGRESO)

ADELAJDO

4-13 Januaro, 2019

LERNU ... ESPLORU ... AMIKIĜU

speciala gasto

EKDE TIAM

Libro recenzo

ANTAŬ UNU JARCENTO – La granda milito kaj Esperanto de Jose Salguero kaj Javier Alcalde

SANDOR HORVATH (ADELAJDO)

Kiam mi renkontis Kani (Jose Salguero), unu el la aŭtoroj dum la UK en Lisbono, mi kvazaŭ **devis** iri al la prezentado de lia libro, aĉeti ĝin kaj poste eĉ legi ĝin. Mi estas tre kontenta ke mi faris tion.

Dum la lastaj kvar jaroj abundis la centjariĝaj eventoj, artikoloj kaj libroj: la sarajeva atenco, la komenco, la daŭro kaj la fino de la Unua Mondmilito.

Ni ĉefe aŭdis pri la grandaj bataloj de Verduno, Sommo, ... kaj ĉe ni en Aŭstralio kompreneble pri Gallipoli, sed ni ne multe aŭdis kio okazis en Germanio, en Hungario, en Turkio, Hispanio, Japanio, Sudameriko, Afriko aŭ aliaj mondpartoj.

Ankaŭ por ni esperantistoj grava demando estas: kiajn efikojn havis la Granda Milito sur esperantistoj kaj kiel esperantistoj adaptiĝis al la nova situacio.

Antaŭ unu jarcento donas **kelkajn** respondojn; samtempe ĝi instigas kompreneble pliajn demandojn.

La libro estas tre ampleksa, multfaceta traktado de la rilatoj inter Esperanto kaj la Granda Milito.

*La unua parto estas pri la ne tiel konataj lokoj kaj eventoj de la milito, tradukoj el



aliaj lingvoj, ne rekte ligitaj al Esperanto. Jen kelkaj por mi interesaj pecetoj:

- La unua surprizo: unu paĝa kontribuo de nia Henry Broadbent el Melburno: la unua pafo de la milito okazis en Aŭstralio. Matene, la 5-an de aŭgusto 1914, la kanonoj de Fuerto Nepean en la melburna haveno pafis al la germana vaporŝipo "Pfalz".
- Mi ne vere sciis, ke Hispanio estis oficiale neŭtrala. Oni eĉ konsideris starigi packonferencon en Madrido sed kun la daŭro de la milito, tiu neŭtraleco fariĝis pli kaj pli neebla.
- Tradukita taglibro de Maurius Paulet tre bone montras la ĉiutagan vivon de

Kun Kani dum la 2005 UK en Vilno



simpla franca soldato dum la komencaj monatoj de la milito.

- Menciita estas ankaŭ la “kristnaska renkontiĝo” apud Neuville-Saint-Vaast. La malamikoj ĉesis pafi, kune trinkis kaj eĉ ludis piedpilkajn matĉojn. (Filmo: Joyeux Noël).
- Nikolao Gudskov bone montras ke en Rusio la Granda Milito restas – eĉ ĝis hodiaŭ – iom forgesita, iom nebulkovrita de la postaj eventoj.
- Sur pli ol cent paĝoj Robert Murray, brita soldato, rakontas pri siaj travivaĵoj kaj aventuroj dum la milito. Li verkas pri siaj vojaĝoj al multaj landoj (Mezoriento, Grekio) preskaŭ senemocie, kaj oni havis la senton ke, por li, la tuta afero estis granda turisma aventuro.
- Simile al la neagnosko por niaj aborigenaj popoloj, afrikanoj preskaŭ ne estas menciitaj en historio, kvankam ĉiu granda potenco devigis multajn indiĝenajn batali por ĝi.
- Unu ĉapitro traktas la kalumnian sekretan Sykes-Picot-akordon, kiu grandparte helpas klarigi kio okazas en Mezoriento eĉ hodiaŭ.
- Mi surpriziĝis ekscii, ke ankaŭ Japanio, rigardante la komencon de la milito kiel oportunon por disvastigi sian potencon en Ĉinio, deklaris militon al Germanio.

La dua parto – kaj por mi eĉ pli interesa – estas la ligo inter Esperanto kaj la milito. Kion faris, spertis kaj pensis esperantistoj? Ĉi-tie mi povas menci i nur kelkajn pecetojn.

- Edmund Privat bone priskribas la lastajn monatojn de Zamenhof en Pollando. Kvankam korvundita de la milito, la majstro daŭrigis sian homanarisman laboron. Lia “Letero al diplomatoj” el 1915, lia verŝajne plej forta skribaĵo, ne estas vaste konata. En ĝi, li memorigas la diplomatojn, ke Eŭropo atendas de ili pacon post la milito. Ĝi ankaŭ povus esti jam dokumento por la venonta Eŭropa Unio. Tre valoras tralegi tiun alvokon al la diplomatoj.

- Alia peceto pri Lanti restis en mia kapo: Lanti (Eŭgeno Adam) kiu laboris ĉe la fronto kiel ambulancisto manpremis la manon de germana militkaptito kaj tuj li fariĝis « germanaĉo ». Tutcerte tiu momento – kaj la milito – konfirmis lian naŭzon kontraŭ ĉio nacieca.
- Ironie restas, ke la 10-a UK en Parizo ĵus komenciĝis je la eksplodo de la milito. Ĝi estintus la plej granda. 3789 partoprenantoj aliĝis. Samtempe ĝi estintus ankaŭ la plej granda koncentriĝo de pacifistoj de la tuta historio. Eĉ Zamenhof jam estis survoje kaj la nuligo estis grandega ŝoko ankaŭ por Esperantujo.
- Kelkaj Esperanto-ĵurnaloj subtenis la ideologion de sia lando, sed la plimulto daŭris kun la pacideoj de Esperanto.
- Mi iomete sciis, sed tamen mi surpriziĝis pri la nombro de Esperanto-kursoj en diversaj militkaptejoj. La plej memorinda rakonto kiu restas en mia kapo estas de rusoj Vasiliĝ Nikitoviĉ Gasiĉ. Li lernis Esperanton en koncentrejo per franca esperantisto. Li fuĝis kaj de la franco li ricevis kelkajn nomojn de germanaj kaj polaj esperantistoj. Ili helpis lin survoje kaj li fakte atingis sian hejmon.
- Mi estis impresita de la homama agado de UEA. « Niaj mortintoj » kaj « Esperantistaj militkaptitoj » fariĝis regulaj partoj de la UEA revuo. UEA helpis spuri homojn, disdoni mangaĵojn kaj vestaĵojn. Tiuj servoj verŝajne superis 100,000 jare.
- Esperantistoj realigis mirindan helpagadon. Bona ekzemplo:
- En Aŭstrio, fine de la milito, la nutraĵo ne sufiĉis. Pro la invito de hispanaj esperantistoj 328 infanoj el Aŭstrio, cefe el Graz, vojaĝis al Hispanio por ripozi dum la suferigaj jaroj.

La aŭtoroj ankoraŭ klopodis esplori la demandon, ĉu eble esperantistoj ĝenerale

havas pli humanan mondorigardon ol neesperantistoj. Ĝenerale, ili konkludas, ne estas apartaj diferencoj... Ili tamen remarkis ke la personaj rakontoj de esperantistoj pri la milito ĝenerale montras pli grandan transnaciecan aliron al aferoj de memoro kaj historio.

Ofte mi sentis min translokigita en la senesperan realon de la tiama ĉiutaga vivo. La libro trasentigas la multnuancan homecon de militspertoj, la milionojn da

perditaj vivoj, la sennombrajn perdatajn vivojn nome de vakaj sloganoj pri nacio kaj imperio. La forto de la libro estas la diverseco de la kontribuantoj.

Ĝi bone montras ke historio havas ĉiam preskaŭ sennombrajn angulojn el kiuj vidi kaj studi la eventojn. La historio de nia lingvo estas tre interesa kaj valoras studi ĝin.

Mi tre rekomendas *Antaŭ unu jarcento*.

Izolitaj Homoj Aŭstalianoj verkintaj en Esperanto

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

.....DAŬRIGATA.....

Nun mi turnas mian atenton al homo vere signifa en la literaturo de Esperanto, kies poemoj aperas en la *Antologio de Esperanto*, la anglo Leonard Noel Mansell Newell, kiu pasigis la lastajn jardekojn de sia vivo en Adelajdo. Len Newell estis kaj prizisto kaj poeto. Lia interesa vivo en diversaj landoj – ekzemple kiel brita kolonia oficisto en Egiptio, kaj dum la Dua Mondmilito kiel spiono en Italio – kontribuis malpli al lia verkado, ol oni dezirus. Ekzemple, kiel interese estus havi en nia lingvo unuapersonan raporton pri la vivo de duobla spionagento, kiu ŝajnis labori por la germanoj en Italio sed samtempe pludonis informojn pri la germanoj al la britoj!

Multaj konas la poemon de Newell pri sia amo al Parizo, finitan en 1927. La sorto decidis, ke 41 jarojn poste li fakte mortu en tiu amata urbo dum trajnvojaĝo. Bonvolu aŭskulti la poemon kun la titolo, simple, Parizo:

*Postlasis mi la koron en Parizo,
Nun restas mia kor' trans la mar';
Revenis mi al hejmo kun valizo,*

*Enue vivi dum alia jar' ...
Sed koron mi postlasis en Parizo.*

*Aĥ, kiom mi sopiras al Parizo!
Eksaltas mia sango en la vejn';
Urbego de gajeco kaj surprizo,
De vino, kaj kafejoj apud Seine
Ĉielon spegulanta el turkiso.*

*Printempe verdas arboj en Parizo,
Bluetajn ombrojn ĵetas Notre Dame,
Kaj kajoj malvarmetaj de Parizo
Dormetas sub karesa suna flam'
Ĝis brilos lampoj sub krepuska grizo.*

*Tre belaj estas Moskvo kaj Kadizo,
Berlino, Buda, Romo kaj Vien';
Pli bela estas urbo sur Tamizo;
Sed ravas min nun franca la siren':
Min sorĉos ĝis la morto nur Parizo.*

*Da rimoj elĉerpiĝis la provizo:
Mi finu. Sed komprenu anĝelar':
Post morto min atendos Paradizo,
Sed iros al Ĉiel' nur ŝelo – ĉar
Mi lasos mian koron en Parizo.*

Leganto de la poemoj de Newell konstatos, ke lin obsedas la tempopaso

kaj nia nekapablo atingi tion, kion ni volas en nia limigita tempoporcio. Sed li povis kombini tion kun senso por humuro. Mi legos al vi la poemeton Filozofa:

*Mi prunteprenis libron el la librar' publika,
Ĉar jukis mian menson demand' metafizika.
Sur paĝo dudek-sepa mi trovis araneon;
Ĝi volis filozofi, sed trafis la pereon.
Anstataŭ kapti muŝojn, ĝi retis mond-enigmon,*

*Lasante sur la paĝo realan esto-stigmon.
Komence de la vorto "epistemologio"
Ĝi ŝpinis en direkto de la koncepto "scio"
Pri l' fenomenaj kosmo kaj la etern-ideo:
La libron lu fermis: adiaŭ, araneo.*

Tiujn du poemojn kaj multajn pluajn vi trovos en la volumeto kun la pala titolo *Kolektitaj poemoj*, unue eldonita en 1938. La eldono de 1987 enhavas tre bonan enkondukon de Edwin de Kock.

Sed mi preferas la prozverkojn de Newell. Lia *Bakŝiŝ*, eldonita same en 1938 en Budapeŝto, estas novelaro pri lia tempo en la brita kolonia servo en Egiptio. Jen mondo tute malaperinta, de la ankoraŭ plej granda imperio de la monda historio – sed jam trostreĉita kaj falonta. Newell estas nekuraceble brita, sed li tre bone observis sin kaj la aliajn britojn kaj la diversajn tavolojn de la egipta socio. Mi ŝatus kredi, ke lia esperantismo donis al li pli larĝan perspektivon ol havintus neesperantista kolonia burokrato. Ĉiukaze liaj rakontoj estas vera legoĝuo. Mi legu al vi la unuan alineon de la scenaro kun la titolo *Bakŝiŝ*, kiu donis la nomon al la tuta kolekto:

Ni staris sur Bastiono de la Citadelo, alte en la vespera aero; sub la piedoj kuŝis Kairo, etendiĝante ĝis la sabloj de la horizonto, kie tranĉis la palbluan ĉielon la arogeme silentaj Piramidoj. Malantaŭ ni estis muroj kaj fortikaĵoj konstruitaj de Napoleono, de

la Mamelukoj, kaj de la granda Muhammad Ali; kaj en tiuj palacoj oni nun aŭdis la signalajn vokojn kaj la klarionojn de la anglaj soldatoj. Antaŭ ni staris la domoj de la kairaj milionoj: kunpremita amaso da verva, baraktanta vivo, senĉese luktanta por pano, por volupto, por feliĉo, por amo, por iom da ripozo. Sed nun silente; silente staris la sennombraj domoj kaj minaretoj, oraj kie lavis ilin la horizontalaj radioj de la suno, brune purpuraj en la ombroj kaj en la ombraj stratoj. Estis la horo de la vespera preĝo; kaj miloj da etaj fum-kolonetoj leviĝis al la blua zenito.

Do Newell certe estis vortpentristo, sed li kapablis ankaŭ akute observi societajn kutimojn kaj redoni kun ioma ironio. Ni aŭskultu peceton de la rakonto *La svatanto*:

En Europo oni plej nature kaj facile amikiĝas al fraŭlino se oni estas fraŭlo; la honestaj knabinoj ne kutimas altiri la atenton de la edzoj. Kontraŭe, en Egiptujo, mi konatiĝis kun Nigma ĝuste tial, ke mi ne estis fraŭlo, sed respektinda kaj sendanĝera edzo. Se oni vidus ŝin parolanta al mi (diskrete, kompreneble, sen troa ridado), tamen ne povus esti skandalo; se oni estus vidinta ŝin babilanta kun juna senedzina viro, ŝia reputacio estus ruinigita por ĉiam kun, por egiptino, teruraj sekvoj.

Mi kredas, ke nuntempe oni konas Newell ĉefe kiel tradukinton de la ŝekspira *Hamleto*, sed la propraj plumoj bele ornamas lin. Ke mi kontrabandis lin en la grupon de aŭstraliaj verkistoj, oni grandkore pardonu al mi. Sed li ja decidis pasigi la lastan parton de la vivo en ĝuste tiu ĉi urbo.

^^^^

Ni venu nun al la plej ambicia verko en nia listo, *Kanako el Kananam*, de Kenneth Gordon Linton, aperinta en 1960. Ken estis soldato kun la aŭstralia armeo en Nova Gvineo dum la Dua

Mondmilito. Tiu ĉi verko, kiun oni nomas “romano”, ŝajnas al mi preskaŭ taglibra rakonto pri liaj rilatoj kun la lokaj indiĝenoj, kaj cetere li uzas sian veran nomon. La milito kontraŭ la japanoj rolas tute fone. Kaj ĉar Ken estas esperantisto – aŭ estos iom poste – la ŝlosilo al la kreskado de lia amikeco kun la indiĝenoj de Nova Gvineo estas lia lernado de la pisina, pli bone konata kiel piĝin-angla, la interlingvo de tiu insulego. Ke anglalingvulo lernas alian lingvon por rilati al lokaj homoj, ne okazas ĉiutage. Ken estas ne tipa eŭropdevenulo: li vere volas rilati homo-al-home kun la indiĝenoj, dum eĉ relative bona kolonia disktrikta policoficisto, eksciinte, ke Ken volas lerni la pisanan, donas al li bonintencan konsilon:

Memoru la jenon: Plene ellernu ilian lingvon, nepre respektu iliajn kredojn kaj kutimojn, sed, kio ajn okazu, konservu vian superecon, ĉiam agante kvazaŭ vi plene estrus la situacion, eĉ kiam vi sentas alie. Ilia amikiĝo estus senvalora, se vi pagus por ĝi per via prestiĝo. Veraj amikecoj inter nigrujoj kaj blankuloj estas tre maloftaj.

Alivorte: Ni blankuloj estas membroj de supera raso, kaj devas ĉiam tion montri. Sed Ken Linton deziris veran amikecon, ne mastro-servisto-rilatojn. Unu el liaj atingoj estas, ke fine lia plej intima amiko, Mageu, nomas lin “Ken” kaj ne “Mastro”.

Kiel mi diris, la verko ne vere estas romano. Nur unu parto havas iom romanecan intrigon. Labadu, la 18-jara nepo de lia amiko Mageu, volas edzinigi Silia, filinon de Kamia, kiu loĝas en apuda vilaĝo. Sed Kamia, la eventuala bopatro, estas tre postulema: li transdonos sian filinon nur, se Labadu donacos al li du porkojn. La problemo estas, ke dum la japanoj okupaciis tiun regionon, ili mortpafis ĉiujn porkojn,

kaj Labadu vidas nenian perspektivon, ke li iam akiros la du bestojn. Kiam li proponas al Kamia multajn kokinojn anstataŭe, Kamia kolere respondas, ke li jam havas pli da kokinoj, ol li bezonas – li postulas porkojn. Do Ken Linton kaj liaj aŭstraliaj amikoj decidas organizi ĉason sur granda insulo Kar Kar, kie porkoj abundas. La ĉaso estas iom danĝera entrepreno, ĉar grandaj porkoj en natura medio ĝismorte luktas por sin defendi, sed kompreneble la aŭstralianoj, kun la helpo de kelkaj indiĝenoj, mortpafas serion da grandaj porkoj kaj krome kaptas kelkajn porkidojn, kiuj ja post ioma kreskado plenumas la postulojn de Kamia. La libro finiĝas per la geedziĝfesto de Labadu kaj Silia.

Sed oni ne legu *Kanako el Kananam* por trovi streĉan rakonton. La valoro de la libro estas ĝiaj priskriboj de pejzaĝoj de tiu bela kaj “sovaĝa” lando kaj la renkontiĝoj de blankuloj de la dudeka jarcento kun homoj el ŝtonepoka kulturo. Ni bildigu al ni jenan scenon (cetere, *trikadno* estas tiu marbesto nomata angle *clam*, kaj *aktinio* estas *sea anemone*):

Kelkajn minutojn poste mi vidis la plej belan fiŝon, kiun mi iam ajn vidis. La korpo de la fiŝo, pale violkolora kun arĝentaj makuletoj, estis nur dek kvin centimetrojn longa, sed ĉirkaŭita de longaj fluantaj naĝiloj el rozviole, palbluo, kremkoloro, palverdo, kaj rozkoloro. Tiuj ĉi, elstarante ĉiudirekten, kaj flirtante kiel delikataj rubandoj, donis al la fiŝo la aspekton de bela multkolora stelo en la akvo.

Tamen, en la pli malprofundaj lokoj, kien Mageu nun kondukis, pli mirigaj estaĵoj estis videblaj. Ĉi tie, kie la akvo estis malpli ol unu metron profunda, mi povis vidi mezgrandan trikadnon proksimume duonmetron longan. Ties karno, hele verda kun nigraj makuletoj, nun tiel kovris la plene malfermitajn valvojn ke, similante

grandan belan floron, ĝi kaŝis la fortegajn kruelajn makzelojn, kiuj tiel embuskos la unuan viktimon tuŝontan tiujn fatalajn lipojn.

Sur la supra valvo de ĉi tiu natura kaptilo kreskis belega aktinio, kies longaj delikataj rozkoloraj petalsimilaj tentakloj konstante moviĝis.

Mageu klarigis, ke la moviĝon kaŭzas malgranda fiŝo ĉirkaŭnaĝanta inter tiuj flirtantaj tentakloj, kies tuŝo estas tiel fatala al ĉiu fiŝo krom ĝi. Ĉi tiu malgranda fiŝo, purpure bruna kun flava zono malantaŭ la blanko, agas kiel trompoganto al pli grandaj fiŝoj kiuj, provante ĝin kapti, estas allogataj al sia propra morto. La malgranda perfidulo tiam partoprenas la festenon ĉe la korpo de la viktimo.

La klimakso de la eventaro estas la geedziĝa festo, dum kiu Ken ricevas

informon, ke li foriros la postan tagon al Aŭstralio. Tre malvolonte li adiaŭas la novgvineajn amikojn:

“Adiaŭ, Mageu. Eble mi iam revenos.”

“Adiaŭ, Ken ... mi ne kuraĝas sopiri al via reveno. Mi nur petas, ke vi memoru min.”

“Memori vin! Mi neniam povos forgesi miajn Kananamajn geamikojn,” mi diris...

Neniam mi forgesos la scenon, kiun prezentis tiu malproksimiĝanta strando, kie kolektiĝis la karnovale vestitaj kanakoj tenantaj torĉojn, kiuj verŝis ruĝetan lumon sur la tropikan ĉirkaŭaĵon. Frapadante tamburojn laŭ malrapida ritmo, ili kantis strangan melankolian melodion.

.....DAŬRIGOTA.....

Kio estas familio?

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

La vorto “familio” signifas tiom multe da aferoj, kiom estas homoj. La plej ideala senco de la vorto en nia socio (ĝuste aŭ ne) ofte inkluzivas feliĉajn patron kaj patrinojn kun iliaj idoj, plenan aron de malavaraj geavoj, kaj multajn amemajn onklojn kaj onklinojn.

Niaj filmoj, gazetoj kaj reklamoj ofte prezentas tiun bildon de perfekteco kaj ni strebas ŝajnigi al la mondo ke nia familio estas tiel perfekta.

Se vi vere apartenas al tia familio, vi aŭ mensogas, aŭ estas tre bonŝanca. Laŭ mia scio, mi ankoraŭ ne konatiĝis kun iu sen ia familia sekreto aŭ kaŝinda (eble nur laŭ socio) hontetaĵo.

Sed ni ne hontu, ĉar vivo estas nature senorda kaj homoj estas komplikaj bestoj. Ni havas verajn,

belajn, kompleksajn familiojn kun vic-familianoj, krimuloj, plej ŝatataj kuzoj, homoj de diversaj landoj kaj kredoj, samseksemuloj, hontigaj onkl(in)oj, homoj kiuj ŝanĝiĝis, homoj kiuj ne ŝanĝiĝos, evitindaj parencoj, kaj el inter ĉiuj tiuj, ni havas homojn kiujn ni kare amas.

Vi konas vian propran familion, kaj kiel vi taksas la homojn en ĝi. Au ĉu?

Antaŭ malmultaj jardekoj, homoj parolis eĉ malpli ol nun pri familiaj aferoj, kaj forte kaŝus ion ajn, kio montrus, ke ilia familio estas iel neperfekta aŭ nenormala.

Mia patro estis unu el tiuj maloftaj bonŝanculoj, kiuj havas tute normalan, sufiĉe idealan familion. Li kreskis en Novsudkimrujo kun sia patro, patrino, fratino kaj multaj el tiuj amemaj

geonkloj (en tiu tempo oni nomis familiajn amikojn onklo kaj onklino, do eĉ patro ne scias kiuj el tiuj estis veraj parencoj, sed ili almenaŭ ŝajnis familianoj).

Liaj gepatroj posedis sian propran domon, ili pagis kontante kontraŭ ilia aŭtomobilo kaj la familio ofte vojaĝis kaj tendumis tra Aŭstralio. Bedaŭrinde mia avino mortis kiam mia patro estis 26 jaraĝa, sed ankoraŭ restis multe da amo en la familio.

Ĉi tiu perfekta, ideala familio ekzistis ĝis mia patro estis ĉirkaŭ 38 jaraĝa, kiam mia avo eniris la malsanulejon pro koratako. Li estis malsana sed ne mortanta, kaj restis tie sufiĉe longe ke mia onklino iris al lia domo por purigi ĝin dum lia foresto.

Tie, en ŝranko, ŝi trovis ladskatolon kiu ne plu enhavis biskvitojn, sed paperojn.

Mia patro ricevis telefonvokon de ŝi, kaj ŝi diris: "Ni estas adoptitaj. Mi ĵus trovis la paperojn." Mi ne povas imagi la ŝokon de tiu novaĵo, sed ili kune decidis kopii la paperojn, remeti ilin ĝuste kiel trovitaj, kaj diri nenion

al ilia patro.

Ĉiuj daŭre vivis kiel nenio okazis. Mia avo venis hejmen de la malsanulejo kaj vivis dum pli ol 10 jaroj plue. Li neniam informis siajn idojn pri la vero, tamen li ofte diris al mia patro, eĉ en lia juneco, "estas saĝa viro, kiu konas sian patron".

Mi ne scias kial li decidis daŭrigi la sekreton, aparte ĉar li mem estis adoptita de familio kiu kunportis lin al Aŭstralio, kaj neniam hontis pri tio.

Do, la familio ne ŝanĝiĝis, sed kiam mia patro iris al la kuracisto kaj tiu demandis pri malsanoj en lia historio, li ne plu povis doni respondon, krom "mi ne scias".

Kiam mi iĝis sufiĉe aĝa, mi interesiĝis pri la cetero de la rakontoj estas la naskfamilianoj? Kaj mi komencis naŭ jaran serĉon por ili, uzante sufiĉe novajn teknologiojn kiel la interreto kaj DNA-testado. Se vi volas aŭdi la plenan, ofte nekredetblan sed ĉiam interesan rakonton pri kio (kaj eble kiuj) mi finfine eltrovis, venu al mia prelego dum la kongreso en Adelajdo en januaro!

Miaj patro kaj geavoj



Trajto de ĝentileco

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

La ĵus eldonita libro “Tagoj kaj ruinoj” de Jaŭme Graŭ Casas, kun traduko kaj komentoj de Miguel Fernandez, priskribas la travivaĵojn de Jaŭme en la diversaj francaj koncentrejoj al kiuj li estis sendita pro falsa akuzo, ke li incitis la homojn al ribelo kontraŭ la reĝimo de Franco. Jen unu el ili:

“Hodiaŭ mi spertis ĉagrenon.....

Antaŭ du horoj la cenzuro redonis al mi koverton antaŭhieraŭ poŝtitan de mi. Kaj oni ĝin redonis al mi sen ajna parola klarigo, sen alia indiko ol granda R, farita per blua kraĵono, kiu probable signifas “Retour” (reveno). La koverto enhavis leteron mian en la franca kaj la francigon de rakonto miapluma originale verkita en la kataluna kaj francigita de mi mem. Sed hodiaŭ en la koverto troviĝas mia letero kaj mia fragmento disŝiritaj, dispecigitaj: 54 paperpecoj! (12 de la letero, 42 de la rakonto).

Vidante la koverton, mi tuj supozis, ke la motivo de la redono estis la sendo de literatura fragmento, ago malpermesata, eĉ se la teksto tute ne rilatas al la koncentrejaj aferoj aŭ al la franca loĝantaro, sed mi ne supozis, ke ili faros al mi la honoron dispecigi min! Oni povintus disŝiri la literaturan fragmenton kaj sendi al la adresato nur la leteron... La cenzuristo aldonis al sia cenzuro sian ferocecon.

De la tradukita fragmento mi gardis kopion, sed ne de la letero, kiun mi sentis min devigata rekonstrui aŭ restaŭri kunigante la liliputajn paperpecojn kvazaŭ puzlo-



pecojn. Post tia kaprompa tasko, la martirigita papero denove diris jenon.....”

Mi povas kunsenti la malĝojojn, miksitan de indigno de Jaŭme ĉar tion mi spertis kiam la tiama sekretariino de AEA resendis al mi mian ĉekon dispecigitan, tamen ne en tiom multe da pecetoj. Do al mi estis multe pli facile rekunigi la pecetojn. Ĉu mi havas karakteron tre similan al tiu de Jaŭme tiel, ke mi same reagis aŭ ĉu tio estas pli ĝenerala homa konduto?

Mi konfesas, ke mi ĵetis la leterojn kaj mesaĝojn de tiu tempo ĉar mi ne volis per tiuj negativaĵoj obstrukcii la vojon al iro antaŭen. Sed la legado de tiu travivaĵo de Jaŭme Graŭ Casas evidentigis, ke en la fundo de mia koro la emocio daŭre estas viva. Ĉu la tempo vere agas kiel kuracilo?

Kelkaj el miaj Esperanto-travivaĵoj

MARCEL LEEREVELD (MELBURNO)

Por hodiaŭaj Esperantistoj, speciale en Aŭstralio, estas malfacila imagi, ke en la unua duono de la antaŭa jarcento en Eŭropo, por la laboristaj, politike maldekstraj, Esperantistoj, la politikaj idealoj kiel socialismo kaj komunismo kaj pacifismo kaj anarĥiismo estis pli gravaj ol Esperanto. Tamen ili traktis Esperanton tre serioze kiel idealon kaj studis la lingvon ĝenerale pli serioze kaj perfekte ol oni faras nun ekzemple en Aŭstralio. La rezulto de tio estis unue ke ili parolis perfekte nian lingvon, sed ke aliflanke ili volis havi nenian kontakton kun la aliaj, politike nulaj aŭ dekstraj Esperantistoj, konservativaj kapitalistoj aŭ malriĉaj sed kapitalismemaj, kaj nomataj la neŭtralaj Esperantistoj.

Estante deksesjarulo kaj en la meza lernejo, lerninte Esperanton el de lecionoj en la katolika radiostacio, mi membriĝis en unu el la dek-ok laboristaj Esperanto-kluboj en Amsterdamo. Pro mia urbdistrikto en la sudo la membroj estis pli alte salajrataj ol en la pli malriĉaj distriktoj. Post unu jaro da membreco, aŭdinte la aliajn paroli sed mem ne kuraĝa, mi ekparolis kaj baldaŭ parolis same flue kiel la aliaj membroj. Mi ankaŭ trapasis mian unuan ekzamenon, kiel antaŭe faris la aliaj membroj. Ĝi okazis en la urbo 's-Gravenhage, por tuta Nederlando. En la parola parto la novbakita ekzamenisto demandis "Ĉu oni povas transitivigi verbon finiĝantan en "-igi"? Mi diris ke jes kaj li diris ke ne,

kaj li iris al la ĉefekzamenisto, la fama Degenkamp, kiu diris ke jes kiam mi donis la ekzemplon "Mia patrino purigis min, igis min purigi", en kiu kazo mi duan fojon transitivigas. La ekzamenistoj en la dua, plej alta, ekzameno por instruistoj, kiun mi subiris, estis pli kleraj.

La nederlanda Laborista Esperanto-Ligo F.L.E. havis kvinoble pli da membroj ol la neŭtrala. Ĝi havis ĉiujare, je Pasko, sian kongreson, en kies kunvenoj rajtis publike diskuti, por savi tempon, nur unu reprezentanto de ĉiu el la eble kvindek kluboj. Tamen centoj da membroj partoprenis. Sed ĉar en kelkaj foraj vilaĝoj en la malurbo ne ekzistis klubo, tiea individua membro rajtis ankaŭ kundiskuti. Ĉar en certa iu jaro la prezidanto, Bas Wels, neatendite kaj tre ŝokante proponis al la kongreso havi regulan kontakton, por iom kune labori, kun la Esperanto-Asocio neŭtrala, pluraj delegitoj diskutis akre kaj forte kontraŭ tiu propono ĉar ĝi estis kontraŭ la interesoj de la laborista klaso. La kongreso malakceptis la proponon. Sed la proponinta prezidanto agis same politike kiel la nunaj aŭstraliaj politikistoj kaj sukcesis en sia granda urbo Roterdamo menspolucii (=brainwash) la membrojn. Do en la sekvonta kongreso li ree proponis tion. Ree multaj, precipe el Amsterdamo, parolis kontraŭ tio, kaj ankaŭ mi, kiu intertempe ekloĝis en vilaĝo kiel individua membro, plurfoje akre atakis la proponon, tiel ke la prezidanto poste akceptigis

duan proponon, kontraŭ mi, ke individuaj membroj ne plu rajtos paroli en la kunsidoj. Intertempe la prezidantula propono akceptatis. En la kongreso sekvanta venis la propono malpliigi kelkajn rilatojn kun Sennacieca Asocio Tutmonda, S.A.T., kaj ree mi povis akre ataki tiun proponon ĉar intertempe mi starigis en mia vilaĝo Esperanto-klubon, kiu sendis min kiel delegiton al la kongreso. Tamen, nun pro la nova prezidanto Drees, la nederlanda laborpartia ĉefministro, kiu post la mondmilito decidis deklari militon kontraŭ la naskiĝanta Indonezio, oni akceptis la proponon. SAT estis iomete kia la melburna ĵurnalo The Age, publikiganta ĉiujn artikolojn kontraŭ kaj por la registaro.

Pro tiu lasta kongresdecido nia klubo, kaj poste aliaj kaj post tio regule pli da kluboj en la lando forlasis F.L.E., kiu tre timis perdi pli da membroj. Mi estis tre aktiva en tiu agado, kaj mi deziris proponi starigi novan nederlandan Esperanto-organizon pli kunlaborantan kun S.A.T. Sed la sekvontan jaron F.L.E. nuligis sian antaŭjaran decidon kaj reamikiĝis kun S.A.T. Tial la eksigintaj kluboj reaniĝis, kio ŝparis al mi multe da tempo, ĉar estis mi la redaktanto de ilia monata gazeto.

Sed baldaŭ venis la milito kaj la okupado ate de la germana armeo. Tiam ni povis kunveni nur sekrete, kion ni faris. Sed la neŭtralaj Esperantistoj povis esti pli aktivaj, kaj unufoje ili aranĝis, en la centra urbo Utrecht, grandan kunvenon de Esperantistoj, en kiu partoprenis ankaŭ membroj de la katolika kaj protestanta Esperanto-asocioj. Mi estis la sola reprezentanto de la Laborista Asocio. La nura celo estis

diskuti kaj akcepti proponon de iu sinjoro Manders, kiu deziris ke oni elĵetu el la Zamenhofa Fundamento la regulon kiu diras ke la Rekta Objekto ricevas la akuzativan finaĵon "-n". Li evidente estis tre populara inter la neŭtralaj Esperantistoj en Nederlando. Post lia parolado klariganta la neceson ŝanĝi la Fundamenton, oni proponis ne diskuti pri la propono kaj tuj voĉdoni. Mi protestis, ĉar mi volis klarigi kial mi voĉdonos kontraŭ la propono, sed la kunvena prezidanto rifuzis. Mi tamen sukcesis krei al la kunvenantoj mian kontraŭecon, ĉar tio estus la komenco de la disfalo de Esperanto. Post tio oni manleve voĉdonis, kaj preskaŭ ĉiuj levis la manon por jes, kaj nur mi por ne. Cetere neniu konis min kaj mi konis neniun, ĉar neniu alia laborista Esperantisto venis al la kunveno, verŝajne ne sciante pri ĝi. Post la kunveno mi retrobiciklis la kvardek kilometrojn hejmen, kaj la aliaj iris en siaj aŭtomobiloj. La rezolucio iris al la Akademio, kiu malakceptis ĝin, kompreneble. Kelkajn jarojn poste la Akademio akceptis tiun sinjoron, nun doktoron, Manders kiel sian membron. D.ro Manders estis klera persono, sed ne sufiĉe klera por scii, ke li ne bezonis uzi sian rezolucion kontraŭ-Fundamentan, ĉar li povis trovi alian, ĉifoje Fundamentecan, manieron por ne uzi la akuzativon por la rekta objekto. Mi neniam menciis ĝin, ĉar mi opinias ke pli utilas al Esperanto uzi la, por kelkaj, malamatan "-n" ol ion alian. Kaj tial mi ĝojas, ke S.ro Manders estis tre klera sed ne sufiĉe klera.

Antaŭ la milito ruslandanoj ne rajtis esti membroj de SAT, ĉar la redaktoro publikigis same por- kiel

kontraŭbolŝevismajn artikolojn, pro principo de esprimlibero. Do multaj komunistaj Esperantistoj en S.A.T. en la tuta mondo ŝanĝis sian aniĝon el de S.A.T. al membreco ĉe U.E.A. Kiel rezulto eĉ nun mi havas la impreson, ke UEA havas pli da maldekstraj membroj ol SAT, kiu ŝajnas burĝiĝi. Do krom la diktatoroj, S.A.T. nun havas duan malamikon, nome sian propran membraron. Jen, krom la enhavo de la nuntempaj artikoloj, du ekzemploj en kiuj la membroj “forĝesas”, aŭ neniam akceptis, la celon de S.A.T. ke la membroj kleriĝu per amikaj kaj filozofiaj interdiskutoj rezultantaj en pli da kompreno kaj akcepto de aliies politikaj idealoj. Unue: Antaŭ pluraj jaroj la redaktisto decidis ke en miaj artikoloj ne rajtas aperi la Pasiva Voĉo per “-ati” nek la prepoziciaĵoj “ate de” (= by) kaj “ante al” (= done to). Pro tiu diktatoreca cenzuro mi decidis ekŝiĝi el S.A.T. Dua kazo: Antaŭ kelkaj jaroj dum S.A.T.-kongreso iu tre konata itala membro faris prelegon en kiu ŝi hazarde uzis plurajn landonomojn finiĝantajn per “-ujo”. Preskaŭ la tuta aŭdantaro komencis moki ŝin kriante “ujo, ujo, ujo”, tiel ruinigante ŝian paroladon. Ŝi estis tre ŝokita. Tiuj multaj burĝaj elementoj kontraŭas la celojn de S.A.T.

Ĵus antaŭ la milito la nederlandaj SAT-anoj vojaĝis en malkare luita aŭtobuso kun luita ŝoforo tra Germanujo al la SAT-kongreso en Kopenhago, Danujo. Sed tra Germanujo la fenestroj devis esti blindigitaj per nemoveblaj kurtenoj, ĉar la germana registaro deziris, ke ni ne vidu la preparojn por la milito. Tuj trans la germana limo, jam en Danujo, la motoro ne plu volis funkcii, kaj devis riparati, en la malfrua mateno.

Lerninte iom la danan lingvon, mi povis utili trovante ripariston, kaj informante Kopenhagon pri nia malfruo. Ni vojaĝis tra tuta Danujo dum la vespero, kaj do maltrafis la oficialan malfermon de la kongreso, sed bonŝance ni en la aŭtobuso povis aŭdi la tutan ceremonion, ĉar la dana nacia radio elsendis ĝin. Sed la danĝero dum tiu parto de nia vojaĝo estis, ke la sola ŝoforo veturis el la frua mateno kaj plurfoje dum la vespero ekdormis. Pro tio du el niaj membroj sidis apud li por veki lin kiam li ekdormis, ja dum la ŝoforado. Bonŝance la retrovojaĝo iris pli glate. Kaj ni havis bonegan kongreson kaj unutagan ekskurson al Malmo’ en Svedujo.

Tuj post la milito la unua SAT-kongreso estis en Aarhus, ankaŭ en Danujo. Ĉifoje ni vojaĝis bicikle tra Nederlando, poste vagonare tra Germanujo, kaj post tio bicikle tra la dana Jutlando. En tiu de Usono okupita parto de Germanujo ni ne rajtis bicikli, nek piediri, do devis iri vagonare. La vagonaro haltis duonan horon en la stacidomo de Hamburgo, sed ni ne rajtis eliri sur la peronon. Intertempe la hamburgaj Esperantistoj sciis pri nia vojaĝo kaj vizitis nin sur la perono. Sed ili ne rajtis akcepti donacojn el de ni, kaj certe ne manĝaĵojn, ĉar la germanoj devis resti malsataj. Mi tamen eliris el la vagono por foti junan Esperantiston parolantan tra la fenestro kun mia edzino. Mi ankoraŭ havas la foton, kaj la junulo nomiĝis Volo Gueltling. Post dekkvin jaroj ni hazarde rerenkontis lin, en Aŭstralio.

Plasto en oceanoj

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Dum mia restado en Vancouver (Kanado) mi vizitis ankaŭ la akvarion. Tie estas grava sekcio por eduki la publikon rilate la katastrofan ĉeston de plasto en la oceanoj.

Du apudaj grandaj ujoj, unu entenanta meduzojn, la alia malgrandajn travideblajn plastajn sakojn, evidentigas ke la bestoj, kiuj nutras sin per meduzoj ne kapablas vidi la diferencon kaj do glutas plaston, sufokas aŭ suferas diversmaniere.

Surprize granda lavmaŝino staras apud tiuj ujoj. La celo estas atentigi pri la fakto ke en la teksaĵoj de niaj vestoj troviĝas etaj fibretoj, kiujn la filtriloj de la lavmaŝino kaj de la akvoelfluejoj ne kapablas reteni. Sekve ili eniras la marojn kaj oceanojn, kie la fiŝoj kaj aliaj marbestoj ilin glutas. Tio endanĝerigas ne nur la vivaĵojn de la maro sed ankaŭ la homojn, kiuj nutras sin per tiuj vivaĵoj.

Ĉu estas solvoj? Nuntempe ne eblas tute forigi la etajn fibretojn. Sed eblas konscii pri la problemoj kaj zorgeme elekti la teksaĵojn de siaj vestoj. Kompreneble ankaŭ mi preferas malpezajn, facile lavitan, rapide sekiĝantan, ne gladendan teksaĵon, sed por la bonfarto de la oceanoj kaj tie vivantaj estaĵoj valoras akcepti iom malpli da komforto.

Alia konsilo estas ne lavi siajn vestojn tiom ofte. Samtempe iom da akvo estos ŝparita, kio estas ankaŭ dezirata atingo.

Se vi volas scii pli pri la iniciatoj de la sciencistoj, kiuj laboras en la akvario de Vancouver troveblas informoj en la reto, despli ke ĝi estas membro de la organizo Ocean Wise (Atentema pri la Oceanoj). Atentu ankaŭ pri la tago de la oceanoj, la 9an de junio. Eble io estos organizita apud vi cele kontribui al purigado de la oceanoj.



Piroteknikaĵo

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

La estraroj de multaj urboj regalas la loĝantojn per bela piroteknikaĵo, ekzemple en Aŭstralio okaze de la novjaro aŭ en Francujo por festi la finon de la arbitra povo de la reĝo, la 14an de julio. Sed por admiri rimarkindan piroteknikaĵon necesas ĉeesti tiun, elfajrigitan el la monteto de la parko en Saint Cloud, apud Parizo, je la alia flanko de la rivero Seine. Ĝi estas la plej bela en Eŭropo. Ekigis la tradicion la entreprenisto, fondinto de la nova vend/aĉetsistemo "De particulier à particulier" (de individuo al individuo), Patrick Jolly. Ekde antaŭ dek jaroj ĝi okazas ĉiun jaron en la komenco de septembro. Ĝi daŭras unu horon kaj kvardek minutojn. Estas bezonataj 120 teknikistoj kaj 65 piroteknikistoj. 4500 fojojn estas donitaj la ordono fajrigi. 60,000 jetaĵoj estas lanĉitaj

al la ĉielo. Kutime samtempe oni aŭdas anekdoton. Ĉijare temis pri la bruligo ate de la prusoj en 1870 de la kastelo, kiu antaŭe staris sur la monteto.

La 8an de septembro 2018 tiu mirinda piroteknikaĵo kostis milionon da eŭroj, dum la piroteknikaĵo je la 14a de julio kostis 750 000 eŭroj. Sed kiu pagas por ĝi?

23000 enirbiletoj estis venditaj. Ili kostis de 32 ĝis 89 eŭroj. La diferencon pagis Patrick Jolly. Tamen li maltrankviliĝas ĉar la sekureco estas pli kaj pli kosta: en 2016- 14000 eŭroj, en 2017- 31000 eŭroj kaj en 2018- 50000 eŭroj. Ĉu li povos daŭre elteni tian elspezon, jen la demando.

Sed ĉu necesas provizi tiajn distraĵojn? Tiaj ekstravagancoj okazis ankaŭ en Romo nelonge antaŭ ĝia disfalo.




Kiel verki tekston por la elektronika medio

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Vi eble ne regas retejon, sed multaj verŝajne de tempo al tempo verkas aŭ redaktas tekston por retpaĝo, elektronika novaĵletero aŭ simila. Vi eble kredas, ke via sperto kaj lerteco pri verkado kaj Esperanto sufiĉas por tiuj taskoj. Tamen, la postuloj pri verkado por elektronikaj komunikiloj estas iel malsamaj al verkado por presaĵoj.

Eble surprizos vin, ke homoj vere ne legas ĉe la ekrano; ili *fluĝlegas*, uzante ion nomatan la “F-ŝablono” (vidu Bildon 1).



Bildo 1: Tri ekzemploj de la F-ŝablono

Jen tri bildoj de retpaĝoj kovritaj per travideblaj “varmecmapoj”. Tiuj varmecmapoj montras kiujn partojn de ĉiu paĝo estas la plej rigardataj (montrataj per ruĝo aŭ flavo), kiujn estas la malplej rigardataj (montrataj per purpura), kaj kiujn estas preskaŭ nerigardataj (montrataj per grizo). Tiuj varmecmapoj kreiĝis per iloj, kiuj sekvas la okulmovojn de multaj homoj. Kiel vi povas vidi, la ĝenerala tendenco estas rigardi la paĝon malsupren laŭ la maldekstra flanko kaj foje iom dekstren. Tio kreas formon en la varmecmapo, kiu similas al la majuskla litero “F”.

Do, metu ŝlosilajn vortojn kaj vortgrupojn kiel eble plej proksime al la maldekstra flanko de la paĝo (se vi skribas en lingvo maldekstroal-dekstra).

Oni devus havi **nur unu ideon en ĉiu alineo**. Ideala alineo havas nur du ĝis tri liniojn. Tio estas malsimila al la tradicia stilo verki por la presita paĝo.

Se vizitantoj hazarde vidas senrilatan informon, tio blindigas ilin pri la informo, kiun ili deziras. Do, vi devas **tondi, tondi, tondi** vian tekston. Kiom? Nu, vi scios, ke vi sufiĉe tondis (por ekrano) kiam la teksto ekaspektas stranga kaj abrupta sur papero. Ĝis tiam, tiu teksto estos konsumata rapide kaj glate. Sed ne atendu, ke vi tuj tondos ĉion.

En la reto, **enhavo povas aperi en kunteksto, kiujn vi ne planis** (aparte serĉ-rezultoj). Ekzemple, rigardu Bildon 2.



Bildo 2: Afiŝo “Raporto de la Prezidanto 2017” en la retejo esperantohouse.org.au

Se oni vizitus tiun paĝon tuj post alia paĝo en la sama retejo (ekz-e la hejmpaĝo, aŭ “Pri ni”), la kunteksto estus klara. Tamen, se oni vidus tion en listo da serĉ-rezultoj (ekz-e Bildo 3) la kunteksto *ne* estus tiom klara.



Bildo 3: Serĉrezulto en Google

Oni eble demandus, “Kio kaj kie estas Esperanto House?” kaj “Kial Esperanto House havas prezidanton?”

Do, pli bone aldoni ekstran informon ĉe la komenco, ekz-e:

“Prezentita ĉe la Jarkunveno de la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrio la 12-an de novembro 2017, de la prezidanto, Jonathan Cooper”

Bildoj

Ne ĉiuj vizitantoj povos vidi bildojn en retejo (ili eble estas blindaj kaj uzas ekran-legilon, aŭ malŝaltis bildojn en la retumilo pro malrapidega konekto). Pro tio, estas atribuo por la elemento “img” (malongigo por “image”, aŭ “bildo”), kiu estas “alt” (malongigo por “alterantive”, aŭ “alternativo”). Do, **uzu la atribuon “alt” por ĉiu bildo**, ekz-e: ``

Tamen, se bildo estas nur “ornama”, aŭ jam havas apudskribon, donu al la HTML elementon malplanan atribuon, ekz-e:

``

Titoloj

Estas du tipoj de titolo (vidu bildon 4): **fenestro-titolo** (kiu venas el la “kapo” de la HTML-kodo) (supre) kaj **paĝ-titolo** (malsupre).

En Safari por Makintoŝo kiam

ekzistas pli ol unu langeto (aŭ “tab”), la fenestra-titolo povas aperi tute. Tamen en plej multe da retumiloj oni vidas nur parton. Do, la konsiloj estas: **Faru fenestro-titolojn ne tro longaj, je malpli ol 65 skribsignoj. Ankaŭ, skribu titolojn (paĝ- kaj fenestro-titolojn), en kiuj la plej gravaj vortoj venas unue.**

Tamen, paĝo ankaŭ havas subtitolojn. **Uzu ĝustajn titol-elementojn en HTML:** h1 (por la paĝ-titolo), h2, h3, ktp. Ekzemple: H2-titolo devus aperi nur sub h1-titolo. H3-titolo devus aperi nur sub h2-titolo, ktp. (Vidu Bildon 5.)

```
<h1>Kiel mi lernas Esperanton?</h1>
<h2>Ĉeestu Esperantajn lecionojn</h2>
Kursoj en Esperanto, kiuj daŭras ...
<h2>Studu per la Interreto</h2>
<h3>Duolingo</h3>
Senkosta apo kaj retejo ...
<h3>Lernu!</h3>
Retbazitaj kursoj por ĉiu nivelo...
```

Kiel mi lernas Esperanton?

Ĉeestu Esperantajn lecionojn

Kursoj en Esperanto, kiuj daŭras ...

Studu per la Interreto

Duolingo

Senkosta apo kaj retejo ...

Lernu!

Retbazitaj kursoj por ĉiu nivelo...

Bildo 5: Titolo kaj subtitoloj en HTML (supre) kaj sur la paĝo (malsupre)

La dezajno de la retejo zorgos pri la aspekto. Neniam uzu dikliterojn kaj permane pligrandigitajn literojn por

Bildo 4: Fenestro-titolo kaj paĝ-titolo



fari tekston aspekti kiel titolo.

Ligiloj

Ligiloj estas la esenco de la reto. Do, **estu malavara rilate al rilataj ligiloj** (ekzemple “Vidu ankaŭ...” aŭ “Tiuj, kiuj rigardis ĉi tion, ankaŭ vidis...”).

La titolo de la celpaĝo devus esti sama kiel la ligil-teksto. Ekzemple, se oni alklakus ligilon “Nia revuo”, oni devus poste vidi paĝon kun la titolo “Nia revuo”. Alie, la vizitanto estus konfuzata.

Neniam kreu ligilon “Alklaki ĉi tie” – tio estas sensignifa.

Malpligrandigu ligilo-putradon (en la angla, “link-rot”), kaj eksteren kaj enen. Alie, viaj vizitantoj vidos eraron (“Paĝo ne trovita”).

La plej grava konsilo

Se vi lernos nenion alian de ĉi tiu artikolo, memoru ĉi tion:

Penu rigardi vian kreaĵon kiel eksterulo aŭ novulo. Estas tro facile imagi, ke ĉiu rigardas ĉion same kiel ni, aparte tiujn aferojn, kiujn ni mem kreis aŭ prizorgas. Pro tio, estas bona ideo de tempo al tempo montri tion, kion vi verkis al homoj, kiuj havas malsamajn spertojn kiel vi.

* Jonathan havis karieron de pli ol tri jardekoj kiel komunikisto kaj klerigisto, inkluzive de la lastaj dek du jaroj kiel administranto de la retejo de la Art Galerio de Nova Sud-Kimrio. Ankaŭ en lia post-kariero li administras ses retejojn, inkluzive tiujn de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrio. Tamen jen malgarantio: En la retejoj, kiujn li administras, li ne *ĉiam* tute sekvas sian proprajn konsilojn. (La kialoj estas iom komplikaj.) Ĉi tio artikolo estas bazita sur prelego de Jonathan ĉe la dua trilandna kongreso en Bekasi (per Skype).

Kelkaj ĝeneralaj konsiloj pri verkado

Uzu klaran kaj simplan verkadostilon. Elektu mallongajn vortojn, kiuj temas (kiel eble plej multe) pri fizikaj aĵoj, vortojn facile prononceblajn kaj kutimajn.

Konservu la ĉefan propozicion nerompita. Ne rompu ĝin per parentezaj ideoj aŭ propozicioj.

Ne konvertu verbojn al nominativoj. Ekzemple:

“Nia sugesto estas, ke via difino de la celo devus havi pli grandan precizon.”

Tio estas nenecese komplika. Pli simpla estus:

“Ni sugestas, ke vi difinu la celon pli precize.”

Ne trouzu superlativojn kaj krisignojn.

Havu kaj sekvu stil-libreton. Tio ne devas esti *fizika* libreto. Tamen, estas pli bone fari decidojn pri diversaj aferoj *antaŭ* ol oni kreas enhavon, ol poste (kiu necesigus, ke vi revizitu kaj reredaktu paĝojn). Jen pluraj aferoj pri kiuj oni devas fari decidojn: pri mallongigoj, interpunkcio, ne-Esperantaj vortoj, numeraloj, datoj, tempoj kaj telefonnumeroj.

Kelkaj difinoj

“Elektronika medio” inkluzivas la jenajn: retejoj/blogoj, retpoŝto, elektronikaj novaĵleteroj, afiŝoj en sociaj retoj, priskriboj sub filmetoj en YouTube, artikoloj en Vikipedio, ktp. (Estas ankaŭ bitlibroj. Tamen, ĉar ili similas—almenaŭ teorie—al presitaj libroj, precipe sur legiloj kiel la Kindle de Amazon, ĝeneralaj konsiloj pri la elektonika medio ne tiom aplikas.)

“Retumilo” estas ia ajn ilo, per kiu oni vizitas kaj rigardas retpaĝojn, aŭ “retumas”, per komputilo, saĝtelefono aŭ tabulkomputilo. En la angla, la vorto estas “browser”. La plej popularaj nun estas: Chrome, Firefox, Safari kaj eble ankoraŭ Internet Explorer.

“**Enhav-mastruma sistemo**” (en la angla “content management system” aŭ CMS) estas programo aŭ, pli ofte, tre lerta privata retejo, per kiu oni regas aliajn, publikajn retejojn. Enhav-mastrumaj sistemoj inkluzivas: WordPress, Joomla!, Drupal, Weebly, Wix, kaj multaj aliaj.

“**HTML-kodo**” (aŭ simple “**HTML**”) estas metodo por konverti tekston, bildojn kaj filmetojn en retpaĝojn. HTML konsistas el:

- **ordinara teksto**
- **HTML-elementoj**, kiuj determinas, ĉu teksto estas paragrafo, titolo, bildo,

ligilo, aŭ io alia

- **HTML-atribuoj**, kaj...
- **HTML-valoroj**, kiuj donas al elementoj specifajn trajtojn.

Ekzemple:

```
<h1 class="entry-title">Pri ni</h1>
```

Tiu peco da HTML donas al la ĉefa (t.e. unua-nivela) titolo “Pri ni” la klason “entry-title”.

“**Skribsigno**” estas aŭ litero aŭ numeralo aŭ spaco aŭ interpunkcio aŭ eĉ emoĝo. La angla vorto estas “character”. Ekzempla frazo estas: “La pasvorto devas havi pli ol 6 skribsignojn.”

Ekskurso al Peucang Insulo kaj Handeuleum Insulo

KAM LEE (HOBARTO)



Foriro el Sumur. Mankas ĝeto en Sumur, do la ekskursantoj devas uzi malgrandan boaton por iri al la ĉefa ekskursboato.

Grupo de Esperantistoj kaj mi foriris Sumur kaj ni vizitis Peucang Insulo kaj Handeuleum.

Sumur estas marhaveno lokita sur la okcidenta marbordo de Javo. La vojaĝo boate al Peucang Insulo havas distancon de kvindek kilometroj kaj veturtempon de proksimume kvar horoj. Dum ni vojaĝis, mi rimarkis ke la marbordo de la Ujong Kulon Duoninsula marbordo, ĉefe konsistis de arbara malalta ebenaĵo kun tre mallarĝaj sablaj plaĝoj. Antaŭ



Tipa vido de la marbordo de la Ujong Kulon duoninsula regiono.

1883, la loko estis ĉefe farma tero, sed dum la 1883 Krakatoa erupcio multaj vilaĝoj estis detruitaj pro tsunami. Poste la duoninsula regiono fariĝis naturparko kaj la tero reŝanĝis al la natura arbara stato.

Ni ĉeestis ĉe Peucang Insulo, kiu situas en la Panaitan Markolo apud la okcidenta marbordo de Ujong Kulon Duoninsula. Ni dormis unu nokon en du grandaj gastĉambroj en la insulo.

Venontan matenon, ni ekskursis tra pluvbarbaro. Oni certe povas distingi

inter la dika nepenetrebla vegetaĵo kaj la farita piedvojo.

Mi rigardis multajn interesajn grandajn arbojn, kiu inkluzivas la *Ficus benamina* (ploranta saliko, weeping willow). Multaj el la grandaj arboj havas grandajn apogradikojn, kiuj ne penetras profunde an la grundon, sed ili estas tre dikaj kaj ili subtenas la arbon.



Vido de arbo *Ficus benamina* en la pluvarbaro.

Ni ĉeestis ĉe plaĝo havanta blankan sablon. Ĉe la marbordo ni povis vidi grandegan kavernon unu kilometron for. Dum ni revenis mi vidis cervon, kiun mi sukcese fotis.

Ni boate iris al alia insulo kaj ni povas vidi banteng, kiu estas speco de bovo. Laŭ wikipedia, viraj banteng estas nigraj kaj la virinaj banteng estas



Ĉe marbordo kun rokoj kaj blanka sablo.

Esperantistoj staras apud grandegaj arboj en la pluvarbaro.





Vido de malgranda insulo kaj kaverno en la distanco.



Ekskursanto piediranta laŭ pluvarbara piedvojo kaj vido de arbo kun grandaj apogradikoj. Vidita estas dudek cm alta apogradiko trapasanta la piedvojo.



Cervo vidita en la pluvarbaro.

flavbrunaj. Mi vidis dek banteng, kiuj estis flavbrunaj. Kelkaj estas malhelbrunaj kaj pli grandaj ol la aliaj, do ĉu ili fakte estas viraj bestoj?

La lasta vojaĝa vizitloko estis Handeuleum, kiu estas malgranda insulo en la Salamatdang Golfo apud

Banteng (speco de bovo) en naturparko en insulo apud Handeuleum Insulo.



la orienta marbordo de Ujong Kulon Duoninsulo. Ni esperis rigardi la Javan rhinoceros (*Rhinoceros sundaicus*), kiu havas unu kornon. La speco estas en la formorteblo listo kaj 2018 raporto anoncis, ke estas minimume 68 bestoj en la mondo, kaj ili estas nur en la ĝangaloj de la Ujong Kulon Duoninsula regiono. Ĉar estas neniam Javajn rinocerojn en la kaptita stato, la vizito de tiaj bestoj en zoologia gardeno ne estas alternativo.

Bedaŭrinde pro pluvo, ni ne povas piediri en la naturparko kaj provi trovi ĝin. Ni revenis al Sumur kaj la dutaga pacema vojaĝo finiĝis.

Recenzo de “Complete Esperanto”

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Kiam mi eklernis Esperanton en 1970, interretaj kursoj ne ekzistis. Por lerni lingvon, oni aŭ lernis vizaĝ-al-vizaĝe de instruisto aŭ uzis libron (eble kun akompananta vinila disko por prononco). Ĉar mi tute ne sciis, kie trovi iun, kiu povus instrui aŭ eĉ paroli Esperanton, mi lernis el libro, specife *Esperanto* de Cresswell kaj Hartley (2-a eldono, 1968), unu el la fama serio Teach Yourself Books. La metodo estis tradicia sed efektiva. Ĝi instruis gramatikon, sed sen ŝarĝi min per gramatika terminologio aŭ tro multaj konceptoj tro frue. Aliaj libroj uzas ĉi tiun bazan metodon, kun diversaj gradoj de sukceso, inkluzive de *Step by Step in Esperanto* de Butler kaj *The Esperanto Teacher* de Stuttard. Aliaj libroj uzis la “rektan” metodon, per kiu ĉiuj (aŭ plejpartoj) el la materialo estas en Esperanto. Unu tia libro, kiun mi poste uzis kiel lernolibro kune kun lecionoj ĉe Esperanto-Domo en Sidnejo en la 1980-aj jaroj, estis la ofte amuza *A practical course in Esperanto* de Szilágyi.

Nun nova libro eldoniĝis: *Complete Esperanto* de Tim Owen kaj Judith Meyer. Kvankam eldonita sub la nomo “Teach Yourself”, ĝi tute ne estas ĝisdatigita versio de la antaŭa verko de Cresswell kaj Hartley. En dek ok ĉapitroj,



plus gramatika resumo kaj baza vortprovizo (Esperanto al la angla kaj inverse), ĝi donas al la leganto la eblecon progresi de tutkomencanto al iu kun meza flueco (nivelo B2 de CEFR: Komuna Eŭropa Kadro de Referenco por lingvoj).

La libro uzas tion, kion ĝi nomas “Malkovran metodon” (Discovery method), kiu signifas, ke la legantoj estas kuraĝigataj malkovri signifojn kaj skemojn per si mem, por ke ili retenu pli da tio, kion ili lernis. Ĝi ankaŭ havas akompanajn sondosierojn, kiujn oni povas

aŭskulti interrete, aŭ per la apo *Teach Yourself*.

Post Leciono 5 de la originala *Teach Yourself Esperanto* de Creswell kaj Hartley, estas la jena: “Imagu, ke unu bonan tagon vi prenas vian matenan gazeton kaj eltrovas, ke ĝi tute transformiĝis en Esperanton! Ĉiu posta leciono uzos kiel bazo tipan artikolon prenitan de ĉi tiu imaga gazeto...” Kiel alloga estas ĉi tiu revo—ke Esperanto estas adoptita kiel lingvo por ĉiutaga uzo—Owen kaj Meyer sekvas alian metodon. Multaj ekzemploj en la libro uzas realan Esperanto-kulturon kiel la kunteksto, ekzemple Universalajn Kongresojn. Fakte, ĉi tio provizas iom da la humuro de la libro. Ekzemple, sur paĝo 242, oni petas la leganton traduki la jenajn frazojn (“kiuj povus esti utilaj dum via sekva Esperanto-Kongreso”!) en Esperanton:

- a. I don't like the rhythm and melody of this song.
- b. It's too loud.
- c. The guitarist is awful.
- d. I would prefer to listen to the other singer.
- e. It would be quieter somewhere else.
- f. I'd avoid this concert; he sings terribly.
- g. Sorry, I misheard because of the noise.*

Tra la libro estas multaj konsiloj pri Esperanto-kulturo, multaj utilaj esprimoj kaj multaj eblecoj por ke

la leganto ekzercu kaj provu sin.

Por resumi, ĉi tio estus tre bona enkonduko al Esperanto kaj Esperantujo por komencanto, kaj havinda ilo por iu ajn, kiu deziras fortikigi sian tenon de la lingvo.

Complete Esperanto

Verkis: Tim Owen kaj Judith Meyer
Eldonis: Teach Yourself (Hodder and Staughton), Britio, 2018
ISBN: 97881473669185

Interesa parentezaĵo: Unu el la verkistoj, Judith Meyer, estas skipano de Amikumu. Fakte, estas malgranda reklamo sur la malantaŭa kovrilo: “Find Esperanto speakers nearby with the Amikumu app.”

*

- a. Mi ne ŝatas la ritmon kaj melodion de ĉi tiu kanto.
- b. Estas tro laŭte.
- c. La gitaristo estas aĉa.
- d. Mi preferas aŭskulti la alian kantiston.
- e. Estus pli trankvile aliloke.
- f. Mi evitus ĉi tiun koncerton; li kantas aĉe.
- g. Pardonu, mi misaŭdis pro la bruoj.



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Dave Dewar | Assistant Secretary

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.